# * Ŝtopi la Digojn



Seminario pri Aktivula Maturigo

AMO 72, Irano, Aprilo 10

Enkonduka prezento de Stefan MacGill

* La titolo referencas la nederlandan knabo-heroon Hans Brinker, kiu forlasis sket-konkurson, kiam li rimarkis truon en digo protektanta la apudan vilaĝon. Li per sia fingro ŝtopis truon ĝis venis la vilaĝanoj por ripari tiun digon.
* La mesaĝo por ni?  Ni devas trovi la truojn – la malfortajn punktojn – en nia agado kaj provi ŝtopi ilin, precipe tiujn rilate al niaj landaj kaj fakaj asocioj.



# Ni bezonas heroojn

# Enkonduko kaj celoj

* La celo de la seminario estas detale esplori nian movadon por trovi la malfortajn punktojn.
* La seminario kaj ĝia sekvo faros proponojn por ŝtopi la digojn.
* Ni esploros la mondon alfabet-orde laŭ la regionoj de ‘Landa Parad’.
* Ni trovos la malfortaĵojn kaj la uzeblajn kuracajn rimedojn.
* Poste ni formos rekomendojn al UEA kaj aliaj pri tiu digo-ŝtopado

La disdivido provas sekvi vivnivelajn kaj kulturajn kriteriojn. Tio neniel limigas kunlaboron inter regionoj – eĉ ni aktive kuraĝigas tion. Jen la nunaj regionoj alfabetorde:

* **AFRIKO:** Sub-sahara Afriko: Kunlaboro kun MONA
* **AMERIKO:** Latinameriko: Kunlaboro kun Norda Ameriko (Pacifiko)
* **AZIO:** La tuta Azio: Kunlabore kun MONA kaj Pacifiko
* **EŬROPO:** La geografia Eŭropo: Kunlabore kun Azio
* **MONA:** Meza Oriento kaj Norda Afriko (kun Afriko kaj Azio)
* **PACIFIKO:** Oceanio plus Norda Ameriko (kun Azio kaj Latinameriko)

# La monda mozaiko

* Nove konsistigita Afrika Komisiono: komencis aktivigi sin.
* Estrarano de UEA loĝas en Afriko
* Nur du funkciantaj perantoj de kotizoj por UEA.
* Fortoj: Aliĝ-petoj al UEA estas senditaj de Tanzanio kaj Ruando
* Malforto: Eburbordo, siatempe komplete forvelkis, nun nur unuopuloj
* Promeso de Universala Kongreso en Afriko (nun prokrastita ĝis 2024)

# Afriko - subsahara




Agado de UEA kaj la aliĝintaj fakaj asocioj tra la regiono

# Ameriko - latinameriko

* La fortoj: Brazilo kaj Kubo; eble Meksiko, Argentino kaj Kolombio.
* Junulara kresko pro Monda Fest', TEJO kaj lingvaj kursoj (2019→2020):
  Kolombio: 5 → 53, Domingo : 5 → 19, Haitio: 1→ 6, Peruo: 4 → 13, Venezuelo: 0 → 7.
* La malfortoj: Bolivio, Urugvajo (rapida membrofalo) kaj ĉiuj aliaj landoj kun movadetoj.
* Landoj komplete sen konata nuna movado: Paragvajo (alirebla!),




Agado de UEA, TEJO kaj la aliĝintaj fakaj asocioj tra la regiono


CENTRA AMERIKO
kaj la KARIBO
kun najbaraj landoj
MEKSIKO
KUBO
HAITIO
NIKARAGVO
KOSTARIKO
VENEZUELO
KOLOMBIO
Monterrey
León
Guadalajara
Meksik-urbo
Mérida
Bahamoj
Kajkoj
Kejmanoj
Domingo
Portoprinco
Jamajko
Belizo
Gvatemalo
Honduro
Gvatemalurbo
Salvadoro
Nikaragvo
Managvo
Arubo
Cartagena
Maracaibo
Karakaso
Panamo
Panamurbo
Medellín
Bogoto
KLARIGOJ
UEA: Landa Asocio
UEA: Landa Asocio Nealiĝinta
TEJO: sekcio
Kresko de junaj membroj
ILEI: sekcio
ILEI: reprezentanto
UMEA: delegito

# Azio - regiono ege granda

* La fortoj: Japanio, Ĉinio, Koreio, Irano, eventuale Vjetnamio kaj Filipinoj
* La filipina movado estas plene junulara
* La mezfortaj: Barato, Nepalo, Mongolio, Indonezio, Pakistano
* La provantaj: Kazaĥio, Uzbekistano, Taĝikio
* La nepraj malfortoj: Tajlando, Kamboĝo, Laoso, Malajzio.

# La Azia Movada Mapo

Rusio estas konsiderata parto de Eŭropo.

Turkio, Armenio kaj Kartvelio estas konsiderataj parto de la regiono MONA.

La mapo vidigas la etendiĝon de la Fakaj Asocioj aliĝintaj al UEA.

KLARIGOJ

- Landaj Asocioj de UEA
- ILEI: sekcioj
- ILEI: reprezentantoj
- TEJO: sekcioj
- IKEF: filioj
- UMEA: delegitoj
- IFEF: sekcio
- LIBE: delegitoj



# Eŭropo

* La fortoj: DE, FR, IT, ES (reta laboro)
* Tra la kontinento: rejunigo bezonata
* Nefortaj: centra eŭropo:  CZ, SK, HU, SI, RO, UA
* Balkanoj: Serbio, Norda Makedonio (deklaris sin mem malaktivaj), Bosnio-H.
* Mortaj: Estonio, Islando, Malto, Kipro, timeble Portugalio

# Mapo: Norda Eŭropo



# Mapo: Okci-denta Eŭropo



# Mapo: Orienta Eŭropo



* La fortoj: Armenio,Turkio, kaj Irano (tiuj du kun admirinda perreta laboro)
* Nefortaj: Tunizio, Maroko
* Malfortaj: Egiptio, Jordanio, Sirio, Alĝerio
* Malekzistaj: Libio, Saudarabio, kaj aliaj
* Bonaj arablingvaj varbiloj ekzistas

# MONA – Mez-Oriento kaj Nord-Afriko

* Kvar landoj kun altaj vivniveloj kaj iom komunaj historioj kaj frua Eo-agado. Plus Meksiko, kiu aperas ankaŭ en Latin-Ameriko.
* Usono kaj Kanado havas belajn prezentojn en siaj retejoj de la multaj lokaj grupoj, kune kun alir-informoj
* Aŭstralio havas plurajn urbajn grupojn en la plimulto da ŝtatoj. Nov-Zelando havas malmultajn lokajn grupojn
* En ĉiuj landoj la indiĝenaj kulturoj meritus pli da vidigo pere de Esperanto

# Pacifiko

| Regiono | UEA - LAA/LAN | ILEI LS/alia | LIBE | IFEF | IKEF Filio/alia | UMEA Sekcio/alia |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Afriko (Subsahara) | 17<br>8 + 9 | 9<br>6 S+3A | 0 | 0 | 6<br>5F +1A | 3<br>0 S + 3 A |
| Ameriko (Latina) | 10<br>9 + 1 | 11<br>3 S + 8 A | 0 | 0 | 2<br>1F + 1A | 2<br>2 S +0 A |
| Azio | 14<br>12 + 2 | 17<br>8 S + 9 A | 1 | 2 | 4<br>4F | 3<br>2 S + 1 A |
| Eŭropo | 36<br>35+1 | 26<br>20 S + 6 A | 21 | 17 | 1<br>1F | 13<br>4 S +9 A |
| MONA | 3<br>2 + 1 | 2<br>2 S | 0 | 0 | 0 | 0 |
| Pacifiko AU/NZ/CA/US | 4<br>4 + 0 | 2<br>2 S | 1 | 0 | 2<br>1F +1A | 1<br>US 1 A |
| | 84<br>+ 15 | 67<br>41 S +26 A | 23 | 19 | 15<br>12F+3A | 22<br>8 S |

Pri ISAE ni ne trovas informojn kaj ni ne ricevas reagojn al niaj petoj

# Fakaj Asocioj tra la mondo

# Retadresoj por aliĝintaj Fakaj Asocioj

* TEJO: https://www.tejo.org/en/

* ILEI: www.ilei.info
* IFEF: http://ifef.free.fr/
* IKEF: https://www.ikef.info/
* UMEA: http://umea.fontoj.net/
* LIBE: http://www.libe.slikom.info/
* ISAE: https://www.scienca-asocio.com/pri-isae

# Rekomendoj

* Rekomendoj por UEA, TEJO kaj ILEI
* Rekomendoj por la Kontinentaj Komisionoj
* Rekomendoj al la Landaj Asocioj
* Rekomendoj al la Fakaj Asocioj
* Rekomendoj al unuopaj aktivuloj

# Rekomendoj pri Afriko

* Aldonu almenaŭ du pliajn kotizperantojn  por la sep aligintaj Landaj Asocioj de UEA plus 4 pliaj asocioj
* Finu la procezon pri akceptigo de la petoj de Tanzanio kaj Ruando aliĝi al UEA
* Subtenu la progresigon de TEJO (4 sekcioj), ILEI (6 sekcioj + 3 reprezentantoj) kaj IKEF (5 filioj)
* Aliaj Aliĝintaj Fakaj Asocioj:
  * UMEA (3 delegitoj), strebu je unu sekcio!
  * IFEF:  Ne havas ĉeeston. Afriko havas novan fervojan kreskon!
  * LIBE: Ne havas ĉeeston. Celinda!

* Stimulu daŭrigon de la forta junulara kresko el 2020 pro plejparte Monda Fest': Kolombio, Domingo, Haitio, Peruo kaj Venezuelo
* Ripetu la hispanlingvan Eo-kurson
* Solidigu tiun kreskon tra Bolivio kaj Urugvajo
* Enpostenigu la nomumitan argentinan komitatanon de UEA
* Enpostenigu aŭ varbu pli da komitataj observantoj. Jam rajtus: Ĉilio, Kolombio, Nikaragvo, Urugvajo.
* Gravas observantoj, ĉar ili partoprenas en la informfluo, sen malfaciligi la kvorumon.

# Rekomendoj Ameriko
## (Latina)

# Rekomendoj por Azio

* Fortigo de la Azia Komisiono – regiona distribuo kune kun kerna laborbrigado.
* Pli da atento al pli disaj partoj: suda Azio kaj la eks-sovetaj landoj.
* Strebado por ke Oceanio reprenu respondecon por si mem ('Azio' jam tro grandas!)
* Subteno de la junulara eksplodo en la Filipinoj.
* Sistema kampanjo por Tajlando, Kamboĝo kaj Laoso.
* Fortaj streboj varbi junajn japanojn al la komunumo.

* Daŭrigu la laboron por varbadi junulojn.
* Ĉesu toleri eterne malaktivajn sekciojn (Serbio kaj Norda Makedonio)
* Donu grandan atenton al Estonio, Bosnio-Hercegovino, Slovenio kaj Portugalio.
* IKEF (komercistoj) varbu pli da Eŭropaj filioj! Certe estas granda potencialo en Centra Eŭropo. Bulgario survojas.

# Rekomendoj por Eŭropo

# Rekomendoj por Pacifiko

* Eluzu la Esperantan komunumon por konigi la kulturojn kaj lingvojn de la maoria popolo kaj same de pliaj indiĝenaj popoloj.
* En Nov-Zelando fortigu la junularan klubon en la Universitato de Aŭklando.
* Daŭrigu la regionajn kongresojn, laŭeble kunlabore kun Azio.
* Kreu kelkajn esperantistojn en la sud-pacifikaj insuloj.

* Kompreneble la estraro kaj la movadanoj volas laŭdi kaj subteni niajn sukcesojn.
* Tamen gravas koni pli detale niajn malfortajn punktojn, por krei planojn limigi ilin.
* En kvar vortoj: Ni ŝtopu la truojn.



# Konkludaj pensoj